

La Riverego

Clay Magalhães en Montrealo	2	Vivi senaŭte	30
La ĉina kaj Esperanto en <i>Najbaroj</i>	9	Ekologia vivstilo : atingeblas	34
Pri lingva historio de Kanado	14	Maloftaj fundamentaj vortoj	36
LangFest 2019 en Montrealo	19	Granda timo	40
Kolekti... birdojn !	24	Kristnaskaj Rakontoj	42
Por la Tero, ni restu surgrunde	26	Eventoj	43

Clay Magalhães en Montrealo !
Clay Magalhães à Montréal !

KKS + LKK + Mtl = ★



Jenja Amis

En majo Montrealon vizitis Clay Magalhães, la Konstanta Kongresa Sekretario (KKS) de UEA, por kelktaga planadvizito por la UK-2020. Okazis kunsidoj kun la Loka Kongresa Komitato (LKK) kaj ĉiuj montrealanoj, vizito al Montreala Turismo kaj renkontiĝoj kun vojaĝagentejoj. Ni multe laboris, promenis, kunmanĝis, vizitis la kongresejon kaj la urbon, kaj... jes, ni ankaŭ multe ridis kaj amuziĝis ! Li estis tre impresita pri la nombro de esperantistoj en nia urbo (dum la vizito li renkontis eble tridekon en diversaj tagoj), pri ilia bona kono de la lingvo kaj la bonega etoso (tio ankaŭ gravas por sukcesigo de la UK !). Clay planas reviziti en aŭtuno 2019 por iom pli longe, kaj ni jam nun malpacience atendas lin denove. Jen kelkaj fotoj de la vizito.



Montrealanoj havis multegajn demandojn por Clay !



Solena subskribo de la Montreala Libro de Renkontiĝoj



Sinprezentoj kaj ridado



Hazarda renkontiĝo de du esperantistoj el Tririvero



Ĉe la Norda Stelo kun la Esperanto-stelo



Iom da frenezado neniam malhelpas !



Clay (re)sciuras en Montrealo !



Labormanĝante sur la teraso de la 37a etaĝo



En la fama montreala Geja Vilaço



Geja Vilaço : la vido de supre (foto: Montreala Turismo)



Complexe Desjardins : parto de la montreala subtera urbo



Nord-Amerik-stila 'brunço' (matentagmanço)



Apud la baziliko Notre-Dame



Spirplene belega interno de la baziliko Notre-Dame



La anglikana preĝejo Sankta Georgo, kie oni planas ekumenan diservon, mondfama pro sia plafono



La katedrala baziliko Maria, Reĝino de la Mondo, farita laŭ la modelo de Sankta Petro en Romo



La (tre) serioza kunsido de la Loka Kata (?) Komitato



Oni plej bone laboras dum la manĝo !



La plej alta konstruaĵo de Montrealo troviĝas nur 5 min for de la kongresejo kaj havas... sketejon !





Bela senpaga aktivaĵo : nur 192 ŝtupoj, kaj... kia vido !



La Monda Komerca Centro kunigas plurajn konstruaĵojn kaj havas pecon de la Berlina Muro






La ĉina kaj Esperanto en *Najbaroj* de Norman McLaren

Alessandra Madella

Ĵenja Amis : Ĉi-jare unu el plej ikonaj kulturaj institucioj, la Nacia Filmoficejo de Kanado (NFO), fariĝas 80-jara. NFO estis fondita en 1939 kaj ĝia ĉefsidejo situas en Montrealo. Ĝi produktis milojn da filmojn kaj gajnis nekalkuleblajn premiojn, tamen malmultaj scias, ke en unu el la plej popularaj NFO-filmoj de ĉiuj tempoj — la filmo *Najbaroj* de mondfama Norman McLaren — aperas... Esperanto ! Por marki la 80-jariĝon de NFO ni republikigas artikolon de Alessandra Madella, granda ŝatanto de NFO kaj profesorino pri la historio de filmarto, kiu instruas en artkolegio en Kunming, Ĉinio. Tiu ĉi artikolo unue aperis en Ĉina Radio Internacia en 2017, gvide al la festivalo « Teo kaj amo ». Cetere, dum la UK-2020 vi havos la okazon konatiĝi kun NFO !

Internacia parabolo

Baldaŭ okazos la dua festivalo de mallongaj filmoj « Teo kaj amo », organizata de Ĉina Radio Internacia. Por digne alproksimiĝi al tiu atendata evento, mi opinias ke gravus rememori faman animacian filmon, kiu en la pasinteco adoptis la internacian mesaĝon de la Zamenhofa lingvo. Temas pri la mallonga *Najbaroj* (*Neighbours*, 1952), kreita de Norman McLaren por la Nacia Filmoficejo (National Film Board/Office national du film) de Kanado. Ĝi ricevis Oskaron en la kategorio de mallongaj dokumentaj filmoj. Ĝia parabola mesaĝo — krom ĝia teknika eksperimentado — igas ĝin ankoraŭ unu el la plej popularaj filmoj, kiujn la Filmoficejo produktis. La intrigo simplas. Du najbaroj trankvile legas siajn ĵurnalojn sur buntaj kuŝoseĝoj, kiam subite bela floro aperas inter ili. Ĝia delica parfumo elĉerpas ilin, kaj komenciĝas batalo pri kiu havos la mirindan floron en sia ĝardeno. La iam pacaj najbaroj vundas unu la



alian, detruas la domon kaj la familion de la rivalo, kaj fine mortas. La skota humoro de McLaren montras al ni du perfekte samajn florojn, kiuj ironie supergrimpas la du tombojn. La frazo ‘Amu vian najbaron’ aperas en dek kvar lingvoj je la fino de tiu ĉi sen-dialoga filmo, kiel moralo de la apologo. Mi argumentas en tiu ĉi artikolo, ke la uzado de la ĉina kaj Esperanto precipe substrekas la universalecon de la temo.

Gravas rimarki, ke McLaren estis jam montrinta intereson pri lingva diverseco. La kanada film-historiisto Malek Khouri en sia libro *Filmante Politikon* (*Filming Politics*) asertas, ke lia serio de ses *Popolaj kantoj*

(*Chants populaires*) en la kvardekaj jaroj estis la sola filmaro kun specife franc-kanadaj temoj, kiun la Nacia Filmoficejo produktis antaŭ sia translokiĝo [de Otavo] al franc-parolanta Montrealo [en 1952]. *Najbaroj* estis produktita en Montrealo, en tiu nova etoso de respekto de lingvaj minoritatoj. La unua lingvo, kiun ĝi uzas

por ĝia parabola mesaĝo, estas la japana, ligante la perforton en la filmo kun la daŭra minaco de atombomboj al la ekzisto de la mondo. La dua lingvo estas tamen la ĉina, pri kio pli longa klarigo bezonatas, pro ĝia graveco en la filma inspiro.

McLaren kaj Ĉinio

La aŭtoro mem konfesis : « Inspiris min fari *Najbarojn* preskaŭ unu-jara restado en la Ĉina Popola Respubliko. Kvankam mi nur spektis la komencon de la Maoista revolucio, mia fido je homa naturo refortikiĝis dank' al ĝi. Poste mi revenis al Kebekio kaj la Korea milito ekis. (...) Mi decidis fari vere fortan filmon kontraŭ militismo kaj la milito. » Fakte en 1949 McLaren estis en Ĉinio por gvidi animacian projekton de UNESKO, dum lia kanada laborloko estis suferanta je makkartistaj ĉasadoj de komunist-simpatiantoj. En siaj leteroj al la gepatroj el Ŝiĉuano, li aprobe notis la bonvenon, kiun la malsataj ĉinaj vilaĝanoj donis al la novaj komunistaj aŭtoritatoj, kiuj vivis tre humile kaj purece, kompare kun la luksego de la ĵus forigitaj naciistaj regantoj. Li tiam substrekis



Norman McLaren (1944)

sian grandan respekton por la Ĉina civilizacio, skribante: « Ĉinio ne estas supera pro tubaroj aŭ meĥanikaĵoj, sed pro simplaj homaj dispozicioj. » Por li la ĉina en *Najbaroj* estis lingvo de paco kaj de pli justa renoviĝo de la homaro. Kiel Esperanto ĝi konstruis ponton trans mem-detruiga fanatikemo.

La projekto de McLaren celis trejni novan

generacion de ĉinaj animaciistoj, kapablaj helpi vilaĝan vivon pere de kartunfilmoj pri malsanoj, higieno kaj nutrado. En la malfacilaj kondiĉoj de civil-milita Ĉinio nur malmultaj animacioj povis esti realigitaj. Tamen en siaj raportoj al UNESKO McLaren rekomendis studi la jam loke ekzistantajn manierojn uzi moviĝantajn bildojn por rakonti historiojn, kiel turniĝantaj afiŝoj por akompani publikan

prezentadon. Tiu restado en Ĉinio estis do ne nur okazo por okcidenta animacia majstro instrui sian arton, sed ankaŭ por serĉi novajn inspirojn por renovigi ĝin.

***Najbaroj* inter tekniko kaj moralo**

Najbaroj estas teknike noviga. Ĝi uzas piksiladon (pixilation), aŭ halt-movan animadon (*stop-motion animation*) de veraj homoj. Ĝi ankaŭ eksperimentas kun sintetikaj sonoj, produktataj pere de ondoformaj linioj rekte fotografitaj sur la son-bendo de la filmo. En tiu lasta, McLaren sin prezentis kiel la heredanto de modernismaj artistoj de la tridekaj jaroj, kiel la germanaj Oskar Fischinger kaj Rudolf Pfenninger, la soveta Arsenij Avraamov, aŭ la hungara László Moholy-Nagy. Plej rekte persona kunligo estas kun la nov-zelanda animaciisto Lenn Lye, kiu estis kolego de McLaren ĉe la Ĝenerala Poŝtoŝefo de Britio antaŭ la dua mondmilito. Sed ankaŭ ĉe la Nacia Filmoficejo de Kanado multas la vizitantoj pli-malpli ligataj al la eŭropa avangarda animacia mondo, kiel Lotte Reiniger kaj la eltrovinto de la pingl-ekrano (*écran d'épingles*), Alexander Alexeiev.

Tamen — kiel ĝia uzado de la ĉina kaj Esperanto montras — la morala karaktero de *Najbaroj* estas almenaŭ tiel grava, kiel ĝia formo. Piksilado kaj



Nicolas Viau vizitis NFO-oficejon, kie oni povas vidi la Oskaron por *Najbaroj*

sintetikaj sonoj ironie komentas la sensencan agadon de fanatike akiremaj homoj. Malgraŭ la leĝereco kaj imagoplena kolora gusto de la plejmulto de liaj verkoj, la plej alta arto por McLaren estis morala arto. Li jam alfrontis la temon de militaj hororoj en 1946, en la paŝtela animacio *Malgranda fantazio pri pentraĵo de la 19a Jarcento* (*Little Phantasy on a 19th Century*

Painting). Lumaj transformadoj de la *Insulo de la mortintoj* de la svisa pentristo Arnold Böcklin aludis al la longaj jaroj de materia kaj psikologia suferado dum la dua mondmilito. La sama pacema spirito, kiu gvidas la uzon de la ĉina kaj de Esperanto en *Najbaroj*, jam troveblis en tiu frua verko.

***Najbaroj* kiel dokumenta filmo**

Tamen la plej granda influo sur la morala filmsenco de McLaren venas verŝajne de lia partopreno en la brita dokument-filma movado, kies kernaj valoroj estis difinitaj de John Grierson — lia estro ĉe la Brita Ĝenerala Poŝtoŝefo kaj poste ĉe la Nacia Filmoficejo de Kanado. Fame Grierson unue konektis la vorton

« dokumenta » (documentary) al film-arto en la angla lingvo. En sia recenzo pri la filmo *Moana* de Robert Flaherty, li tiel laŭdis la etnografian prezentadon de la inici-rito de juna samoano fare de la usona filmisto. Laŭ Betsy McLane en ŝia libro *Nova historio de dokumenta filmo (A New History of Documentary Film)*, la usona verkisto Walter Lippmann sugestis al juna Grierson fokusiĝi sur filmo, kiel amas-komunikilo, kies simpliga drama prezentado de publikaj aferoj povintus generi sufiĉe da entuziasmo por sekurigi civitanan partoprenemon. Kiam Grierson revenis al Britio kaj fondis la britan dokument-filman movadon, tiu ŝtat-konstruiga kaj civitan-eduka celo oferis fortan bazon. En tiu senco, oni povas kompreni la deziron de McLaren, ke *Najbaroj* havu praktikan rolon, kaj lian fieron kiam la Filmoficejo volis montri ĝin al batalantaj afrikaj triboj por konvinki ilin pri la malutileco de militoj. Fakte la morala prestiĝo de McLaren en

Afriko ebligis al li ankaŭ esti ĉe la komenco de animacio en la sub-Sahara regiono, dank' al sia trejnado de la niĝera aŭtoro Moustafa Alassane.

Ne ĉiuj samopinias, ke *Najbaroj* estas dokumenta filmo. Tamen Betsy McLane montras, ke la kvindekaj jaroj estis periodo de granda malfermado de la dokumenta ĝenro. Internaciaj temoj abundis, dank' al la neceso fortigi la novajn internaciajn instituciojn. Kaj la populariĝo de la 16-milimetra formo larĝigis la publikon eksterkinejan. Ĝus antaŭ la disvastiĝo de televido, artema kaj diskutema publiko kreskis en Kanado kaj en Usono. Eksperimentaj dokumentaj filmoj bonveniĝis. En tiu etoso, la morala internaciemo, kiun la ĉina kaj Esperanto alportas al *Najbaroj*, trovis certe taŭgan publikon.

Por la 80-jariĝo de NFO, oni lanĉis la defion 'rekrei NFO-logotipon', kiun ankaŭ partoprenis la aŭtorino (Kunming, Ĉinio, kurtena hedero)



Spektu (senpage) ĉe nfb.ca:
nfb.ca/film/neighbours_voisins



Kelkaj elementoj pri la lingva historio de Kanado

Sylvain Auclair

En la moderna mondo, oni ĝenerale konas Kanadon aŭ kiel anglalingvan landon, aŭ kiel dulingvan landon, kie la angla kaj la franca havas egalan statuson. Sed la vera situacio estas pli komplika. Kiel ĉiam kaj ĉie.

Antaŭ ol venis la unuaj Eŭropanoj, en la unua duono de la XVI-a jarcento, loĝis en tio, kio nun estas Kanado, plurdekoj da popoloj parolantaj plurdekojn da lingvoj, kiuj anas en pluraj lingvofamilioj. Nun plu estas parolataj sesdeko da ili, kaj la plej multaj el ili troviĝas en Brita Kolumbio, verŝajne ĉar montaroj kaŭzas izolitecon.

La unuaj Eŭropanoj en Kanado estis Francoj, dum Angloj (kaj Nederlandanoj) setlis pli sude, en tio, kio iĝos orienta Usono. Sed la situo de la Francoj,

laŭ tiu granda riverego, kiu kondukas al la centro de la kontinento, estis tre avantaĝa. De tie multaj vojaĝis tra la kontinento kaj komercis kun praloĝantoj, uzante la jam ekzistantajn komercajn

rilatojn kaj enŝoviĝante en la militoj, kiuj jam ekzistis antaŭe. Pluraj lernis la lingvojn de tiuj praloĝantoj (tiujn lernintojn, kiuj agis kiel traduktistoj, oni nomis *truchements*, el la araba ترجمان, pruntaĵo el la epoko de la krucmilitoj) kaj kelkaj ekvivis kun ili. La kono de la indianaj lingvoj estis tiel ĝenerala, ke



Francoj, Angloj kaj Nederlandanoj foje uzis irokezan lingvon kiel pontlingvon !

Post diversaj militoj, en Eŭropo kaj Norda Ameriko, la nuntempa Kanado iĝis komplete Brita en 1763. Alvenis anglalingvaj militistoj, negocistoj

kaj setlantoj (pluraj venis el Usono post ĝia sendependiĝo), kaj la franclingvaj loĝantoj perdis siajn kulturajn kaj ekonomiajn gvidantojn, kiuj reiris Eŭropon aŭ tute perdis sian influon. Oni eĉ forpelis la franclingvajn kaj katolikajn loĝantojn, de tio, kio nun estas Nova Skotio. La lingvo de la riĉuloj kaj potenculoj iĝis la angla, ĉefe en urboj kiel Montrealo kaj Kebeko. Francdevenaj kamparanoj plu uzis la francan, sed ĉiuj novaj inventaĵoj kaj laborrilatoj venis kun siaj anglaj nomoj. Submastro estis *foreman*, kaj lavabo estis *sink* (prononcata /sɪŋ/). Lokomotivoj kaj aŭtoj enhavis nur anglalingvajn partojn...



La Debato pri la lingvoj de 1793, pentraĵo de Charles Huot

Dume, pro la Revolucio en Francio, la tiea lingvo multe ŝanĝiĝis, kio igis la francan lingvon parolatan en Kebekio malnoveca, kamparana sublingvo... Claude Piron jam rakontis, ke vizitante Kebekion, dum li loĝis en Novjorko, en la 50-aj jaroj, li tute ne povis kompreni la tiamajn tieajn franclingvanojn.

Lingvopolitiko

La politika pritrakto de la lingva afero en Kanado komenciĝis jam en 1793, kiam la unua elektita asembleo de Malsupra Kanado (la nuna Kebekio ; Supra Kanado estis la nuna Ontario — Nova Skotio, kaj poste Nova Brunsviko kaj aliaj tiam estis tute apartaj kolonioj) devis decidi, ĉu oni *rajtas* uzi la francan dum la diskutoj. Ĉar la franclingvaj deputitoj estis plimulto, la decido

estis, ke ambaŭ lingvoj estu egalrajtaj.

Kiam oni unuigis la diversajn britajn koloniojn kaj la privatan teritorion de la Kompanio de la Hudsona Golfo (kiun mi pli emas nomi Hudsona

Maro — ĝi ja ampleksas preskaŭ duoble la Nigran Maron !) por iom post iom krei la nunan Kanadon, en 1867, oni enkondukis tiun parlamentan lingvegalarajtecon en la Kanadan kaj en la Kebekian Parlamentojn (kaj, por iom da tempo, ankaŭ en la Manitoban Parlamenton, fakte ĝis la tieaj anglalingvanoj iĝis granda plimulto, dudek jarojn

post la starigo de la provinco), sed oni devas tamen diri, ke deputito devis uzi la anglan por esti komprenata de ĉiuj (kvankam ja estis en la Kebekia Parlamento deputitoj, kiuj scipovis nur la francan, kaj aliaj, kiuj scipovis nur la anglan !). Oni ankaŭ tamen devas diri, ke la lingvoj parolataj en la parlamentejoj apenaŭ tuŝas la ĉiutagan vivon de ordinaraj homoj...

Ekde tiu epoko ĝis la 60-aj jaroj okazis du paralelaj movadoj. Ĉie en Kanado venis amasego da enmigrintoj, unue Britaj, poste de pluraj Eŭropaj landoj, sed eĉ tiuj rapide ekuzis la anglan kiel novan lingvon. Al tiu situacio kontribuis la fakto, ke anglalingvaj lernejoj estis libere alireblaj al ĉiuj infanoj, eĉ en Kebekio, kaj ankaŭ la fakto, ke franclingvaj lernejoj estis malpermesitaj aŭ alie fermitaj ie ĉie en Kanada krom Kebekio. Dume, franclingvaj deputitoj en Otavo sukcese luktis por akiri la rajton je dulingvaj poŝtmarkoj aŭ monbiletoj...



Afiŝado en la mohoka lingvo, apud Montrealo

Indianoj

Dum tiu *moderna* epoko, indianaj lingvoj tute ne havis statuson. Tiuj popoloj, kiuj vivis for de la grandaj urboj, grandparte plu povis uzi siajn lingvojn, dum tiuj en la sudo anglalingviĝis aŭ, malpli ofte, franclingviĝis. La Kanada registaro ankaŭ starigis programon por devige *eduki* la indianajn infanojn en internulejoj, kie ili lernus la

anglan aŭ la francan kaj espereble forgesus siajn denaskajn lingvon kaj kulturon, ne indajn plu ekzisti. Tiu programo ekzistis, en diversaj gradoj, de 1876 ĝis... 1996, kiam fermiĝis la lasta el tiuj lernejoj. Krom la kulturan kaj psikan traŭmon, la koncernaj infanoj ofte ankaŭ spertis tre malbonajn vivkondiĉojn. Miloj da ili

mortis ; la precizan nombron oni eĉ ne konas.

De la 60aj jaroj

Post du jarcentoj da kultura, ekonomia kaj lingva malsupereco, kelkaj franclingvaj Kebekianoj lanĉis

senpendisman movadon, kiu preskaŭ sukcesis. En la sama tempo, Kanado malfermis sian pordon al enmigro el pli diversaj landoj. Tio kaŭzis la oficialigon de dulingvismo (kaj de multkulturismo, kio necesus alian artikolon) de la Kanada registaro, sed samtempe ankaŭ la oficialigon de la franca en Kebekio.

La registaraj servoj de la Kanada registaro devas nun estis donataj en la franca, ĉie kie la mendado estas sufiĉa. Por la angla, la nombro ĉie sufiĉas... Ekde 1977, la anglalingvaj lernejoj de Kebekio ekestis rezervitaj al tiuj, kies unu gepatro junaĝe frekventis anglalingvan lernejon en Kebekio. Franclingva komerca afiŝado fariĝis deviga, kaj grandaj entreprenoj devis interne komuniki en la franca. La *Office québécois de la langue française* (la Kebekia oficejo pri la franca lingvo) ekhavis mision zorgi pri tiu leĝo kaj ankaŭ akompani franclingvigon de entreprenoj, interalie per eldono kaj prizorgado de terminara bazo, la *Grand*

Dictionnaire terminologique [granda terminologia vortaro] (www.granddictionnaire.com). Tiu leĝo estas parte nuligita per kanadaj kortumoj, kio kolerigis plurajn Kebekianojn.

En 1982, Kanado adoptis novan konstitucion, kiu devigas instruadon en la *minoritata lingvo* en ĉiuj provincoj (en la angla en Kebekio, en la franca en

la aliaj provincoj) por tiulingvanoj. Tio, plus la jama ebleco ricevi franclingvan televidon kaj radiofonion ĉie en Kanado (kvankam junuloj ja preferas usonanglan kulturon), revigligis franclingvajn komunumojn ie ĉie en Kanado. Statistikoj tamen montras, ke ilia estonteco en ĝenerale anglalingvaj medioj estas necerta.


Socia premo estas forta, kaj la angla nun regas ĉie en la mondo...

Nuna situacio

Krom Montrealo, Toronto kaj Vankuvero, kie ekloĝas plej multaj enmigrintoj, Kanado estas



grandparte unulingva : franclingva en Kebekio, anglalingva en aliaj lokoj. Esceptoj estas Montrealo, kie dulingvismo (aŭ eĉ nuranglalingvismo) estas forte disvastigita, malgraŭ la oficiala volo establi franclingvan socion en Kebekio, kaj kelkaj regionoj en oriento kaj nordo de Ontario kaj en Nova Brunsviko, kie malnovaj franclingvanoj komunumoj plu ekzistas. Ĉiuokaze, scipovo de la angla nepras ekster Kebekio. Iom pli ol 100 000 homoj parolas




indianan lingvon, ĉefe la kria, la inuktituta (ankaŭ konata kiel la eskima), la oǵibva kaj la inua lingvoj. Ĉiu el la pli ol 50 indianaj linvoj estas parolata de malpli ol 10 000 homoj, kaj ofte de malpli ol 1000 homoj, kio malcertigas ilian estontecon, malgraŭ novaj registaraj programoj celantaj pli amase instrui ilin kaj ĝenerale vivigi aŭ revivigi ilin.

Sur la foto : la filmo *Revivigi la Nakotan Lingvon* (de Nacia Filmoficejo de Kanado).

Ĉu vi sciis ?..

En la retejo de la Nacia Filmoficejo de Kanado (ONF.ca france / NFB.ca angle) troviĝas centoj da filmoj fare de indiĝenaj filmfaristoj de Kanado. Pluraj filmoj haveblas ankaŭ en diversaj indiĝenaj lingvoj, kaj oni eĉ povas serĉi ne nur laŭ la kutimaj serĉvortoj, sed ankaŭ laŭ la nacioj de la filmfaristoj : onf.ca/cinema-autochtone.

Ĵenja Amis (redaktoro kaj laboranto de NFO)



LangFest 2019 en Montrealo : por vi, lingvemuloj !

Nicolas Viau

Le Festival des langues de Montréal, ou LangFest, principal point de ralliement pour les polyglottes et passionnés de langues en Amérique du Nord, sera de retour pour sa quatrième édition à Montréal cette année du 23 au 25 août 2019. Nicolas Viau, qui participe à son organisation, donne ici un avant-goût de ce qui attend les participants.

Se vi estas lingvemulo kaj loĝas en aŭ ĉirkaŭ Montrealo, certe dum la pasintaj kelkaj jaroj vi remarkis la aperon de nova evento : LangFest, la Montreala lingva festivalo. Jam de 2016 la evento kunvenigas en Montrealo lingvemulojn de Kebekio, Kanado, la tuta Nordameriko kaj pluraj aliaj landoj de la mondo por amuziĝi, paroli, ĉeesti prelegojn kaj amikiĝi – ĉio pri lingvoj !

Ĉi-jare LangFest okazos de vendredo ĝis dimanĉo, la 23-25-an de aŭgusto, post la jam kelkaj tradiciaj tagoj de sociaj aktivaĵoj por homoj, kiuj ŝatus viziti la urbon kaj ekkoni parton de la partoprenantaro jam antaŭ la prelegaro. Alia grava novaĵo estas, ke unuafoje la evento okazos ne en Universitato Concordia, sed en Universitato de Montrealo (UdeM). LangFest estis tre bonŝanca povi profiti

de tre agrabla urbocentra kampuso ĉe Concordia dum siaj unuaj jaroj, sed ĉi-jare oni povos malkovri novan kvartalon ĉirkaŭ la bela kampuso de la Universitato, sur la alia (norda) flanko de la Monto Royal, meze de la insulo de Montrealo.

Post sukcesaj eventoj en 2016, tiama iniciato de la lingvemuloj Tetsu Yung kaj Joey Perugino, kaj ree en 2017 kaj 2018, kvara evento estis logika – kaj preskaŭ nepre – paŝo. En 2017 kaj 2018, la evento altiris ĉirkaŭ 400 homojn entute, kaj homoj malkovras nin ĉiujare, tiel ke nia lingvemula amikaro daŭre pligrandiĝas !

Kio novos en 2019 ? Interesege por Esperantistoj, planlingvoj estos grava temo de la evento : LangFest bonvenigos David-on J. Peterson, kreinto de la fikciaj dotraka (*Dothraki*) kaj altvaliria (*High*





Valyrian aŭ *haut valyrien*) lingvoj de la fama televidserio *Game of Thrones* (france *Le Trône de fer*), kaj Mark Okrand, kreinto ĉefe de la klingona lingvo de la televidseriaro kaj filmaro *Star Trek*. Estos honorego por LangFest permesi al homoj renkonti tiujn lingvistojn kaj lingvokreintojn, kune !

Kompreneble ankaŭ estos prelegoj pri ĉio cetera, kiu rilatas al lingvoj : ĉu vi ŝatus scii iom pli pri la guĝarata lingvo, pri lingvaĵoj en tekstmesaĝoj, pri lingvoj en Montrealo, pri instruado kaj lernado de lingvoj ? Ĉio ĉi – kaj multe pli – eblas dum LangFest.

Kvankam la aranĝo ne aparte celas Esperantistojn, pluraj novaj – kaj malpli novaj – Esperantoparolantoj partoprenas ĉiujare. Ne maloftas rekonti iun, kiu lernas, aŭ emas lerni ĝin. Oni proponis ĉiun jaron atelieron por enkonduki la lingvon al partoprenantoj. Tian atelieron gvidis ESK-vicprezidanto Suzanne (Suzano) Roy en 2016 kaj 2017, kaj la fama Usona Esperantisto Chuck Smith en 2018. Suzano revenos ĉi-jare por malkovrigi al scivolemuloj la bazojn de nia lingvo. Mi mem plezure prelegis pri la historio kaj kulturo de Esperanto ĝenerale la unuan jaron (kaj en 2017 pri la lingva situacio de Kebekio, kaj pasintjare pri lingvo kaj povo). Krom Suzano Roy, Chuck kaj mi,



Esperanto-tablo dum LangFest-2018



Esperanto-ateliero

laŭ la jaroj diversaj Esperantistoj ankaŭ prelegis : Lýdia Machová, Tony Harris... Ankaŭ la tre fama brita plurlingvulo Richard Simcott (partoprenis en 2017) kaj la irlanda plurlingvulo Benny Lewis (partoprenis en 2016, 2017 kaj 2018) scipovas paroli nian lingvon !

Plie, ni menciui, ke la Nordamerika Esperantistaro kunlaboras kun LangFest de kvazaŭ la komenco. Ni memoru la malavaran subtenon al la evento de la Kanada Esperanto-Asocio (KEA) kaj de Esperanto-USA en 2017, kaj de KEA ree kaj de Esperantic Studies Foundation en 2018. Tiu partneriĝo ankaŭ realiĝis per la starigo de budo pri Esperanto dum la evento mem, por respondi


demandojn de scivolemaj partoprenantoj.

Do la ĉi-somera evento estos perfekta okazo paroli pri alia gravega Montreala evento : la Universala Kongreso de Esperanto en 2020 ! Multaj Kebekiaj, Kanadaj kaj Nordamerikaj lingvemuloj certe interesiĝos pri la eblo lerni aŭ plibonigi sian Esperanton antaŭ Esperanto-aranĝo, kiu verŝajne estos la plej granda en Nordameriko iam ajn ! Do niaj lingvecaj kaj Montrealaj aventuroj nur komenciĝas...

Por pliaj informoj kaj pri biletoj, vizitu montreal.langfest.org.

Atentu, esperantistoj ! Kun la promociĉkodo ESPERANTO vi ricevos 15%-an rabaton ĉi-jare !

Solidareco kun la Sudo !



Normando Fleury

Mi estis en Kubo kvaran fojon en novembro 2018. Mi ŝatas tiun landon, ĉar estas sento de sekureco, kiam vi vojaĝas tie kaj krome estas multaj Esperantistoj.

Dum mia lasta 17-taga restado, mi vizitis 5 urbojn : Contramaestre, Santiago, Guantánamo, Bayamo kaj Guardalavaca. Mi povis samtempe, viziti kvar Esperanto-klubojn kaj konatiĝi kun nekonata parto de tiu lando.

Antaŭ ol ekvojaĝi, mi ja kontaktis ilin, kaj ĉiuj Esperantistoj bonkore helpis min, ĉu pri veturado de la flugejo al gastejo, ĉu per trovo de hejma gastejo kaj tiel plu. Surloke estis same, ili plezure akompanis min, gvidis min kaj invitis min ĉeesti klubajn vesperojn.

Mi sciis, ke estos normale danki ilin, ĉar la

ekonomia situacio en Kubo estas draste malfavora kompare kun la situacio en Kanado. Ĉu vi scias, ke baza salajro estas eĉ ne 30 \$ monate ? Jes, vi bone legis, eĉ kuracisto kaj inĝeniero ne gajnas multe pli ol tio. Nu, vi pensos ke la vivo estas malpli kosta tie, prave. Por nutrado, loĝado tiel estas. Krome, por sano kaj edukado, ĉio estas senpaga por ĉiuj. Sed, se vi volas aĉeti komputilon, telefonon, lavmaŝinon, ŝuojn kaj simile, ne pensu, ke la prezo estos malalta. Temas pri importitaj varoj kun eksterlanda prezo. Imagu, ke uzi reton kostas po 1 \$ hore. Do, Esperantistoj ne

povas facile aliri la mondon de moderna komunikado kaj teknologio. Mia komputileto estis vere mirinda ilo por ili.

Mi do, sciante tion, kunportis du uzitajn portebajn komputilojn, por donaci al du E-klubo. Mi kunportis ankaŭ multajn memorŝlosilojn (USB)



**Dum la renkontiĝo de Amerika Komisiono de UEA :
Normand Fleury (Kanado), Maritza Gutierrez
(Kubo), Mallely Martínez (Meksiko)**

kaj librojn en Esperanto. Tio tiom multe feliĉigis ilin. Mi ankaŭ invitis Esperantistojn vespermanĝi aŭ bierumi vespere, ĉar ili tre malofte havas okazon tion fari. Por mi, pagi bieron aŭ trinkaĵon al 8 personoj por pasigi belajn momentojn kune babilante pri la vivo, kostis 8 \$.

La titolo de mia artikolo aludas al Solidareco kun la Sudo. Do, se vi intencas iri al la UK en Finnlando aŭ al tiu de Montrealo, nepre konservu malnovan poŝtelefonon, komputileton kaj simile, anstataŭ transdoni ĝin al reciklejo. Kompreneble viŝu la

memoron kaj fojfoje ligu ĝin al elektro, tiel ke la baterioj restos uzeblaj. Se vi transdonos tion al kuba Esperantisto dum UK, tio multege utilos al ili. Vi donos al ili eblecon pli efike movadumi, ĉar sen komunikilo malfacilas tion fari en la nuntempa epoko. Konsideru tion, tiel ke ankaŭ vi estos solidareca kun la Esperanto-movado en la Sudo.

P. S. Ne hezitu kontakti min por pliaj informoj, aŭ se vi ŝatus transdoni aparaton al mi por ili. Mi certe reiros al Kubo denove

Kaj kion VI portos al Montrealo-2020 ?

Ĉu vi pensas ĉeesti la UK-on 2020 ? Perfekte, ni jam volas taskigi al vi ion ! 😊 **Tasko unu ! Certigu, ke vi havas libertempon 1-8-a de aŭgusto 2020 kaj komencu kolekti monon por la vojaĝo !**

Iomete da stipendimono haveblas el la UEA-fonduso por helpi partopreni UK-ojn. Se vi ne estas en situacio de bezono kaj ŝatus helpi venigi pli da homoj al la UK-oj, donacu iom da mono al tiu fonduso (financoj@co.uea.org) aŭ al [KEA por UK-2020](mailto:KEA_por_UK-2020).

Tasko du ! Pripensu, kiel vi povus kontribui al la programo ! Ni esperas

havi la plej diversecan kaj riĉan programon, kun multaj prelegoj pri Kanado kaj Nord-Ameriko, kaj kun elstara arta kaj muzika programo. Montru al aliaj esperantistoj vian talenton, aparte se vi neniam antaŭe partoprenis aŭ kontribuis al UK-oj !


Tasko tri : volontulu ! Por sukcesigi tiun ĉi tre ambician projekton ni bezonos multajn volontulojn. La taskoj estos plej diversaj : bonvenigi homojn, gvidi ekskursojn, verki, traduki, foti, ktp. **Se vi ŝatus volontuli, plenigu tiun ĉi formularon : tiny.cc/volontuloj2020**





Kolekti... birdojn !

Normando Fleury



Multaj Esperantistoj kolektas ion. Estas eĉ pluraj esperantistaj asocioj, kiuj grupigas la samtemajn kolektantojn.

En mia junaĝo, multaj junuloj tion faris. Ĉu nuntempe junuloj kolektas ion ? Mi ne esploris la temon. Sed, kiel junulo mi interesiĝis pri la naturo, pri plantoj, birdoj aparte. Kolekti plantojn eblas, sed vi devas premi, sekigi kaj atente konservi ilin. La problemo estas, ke la kolekto rapide okupas grandegan spacon. Nu, mian profesian vivon mi dediĉis al botaniko, sed ekde mia emeritiĝo mi revenis al alia pasio, birdoj.

Ĉu eblas fariĝi kolektanto de birdoj ? Nu, vi povas aĉeti birdojn kaj havi ilin en kaĝoj, sed mi ne ŝatas malliberigi birdojn. Ne eblas mortigi sovaĝajn

birdojn por konservi ilin poste, krom iri ĉasi anserojn, anasojn kaj kelkajn aliajn, sed tio denove okupos grandan spacon, kaj verdire tio fariĝus multekosta kolekto, ĉar vi devus pagi specialiston por pajloŝtopi la mortan birdon.



Dum vizito en Kalifornio, mi feliĉis vidi du egretardeojn kune, la negâ kaj la blua

Do mi kolektas birdojn irante en la naturon por observi ilin. Tio postulas tempon certe, sed estas tre interesa hobia laŭ mi. Unue, la birdoj malsamas laŭ la sezonoj, kaj ankaŭ depende de kie vi troviĝas, ĉu en parko, ĉu apud lago, kaj tiel plu.

Estas preskaŭ 400 000 specioj de plantoj en la mondo, do estus senfina tasko provi rekoni ilin. Pri la monda birdaro, temas pri nur 10 000 specioj. Imagu, se vi decidus trairi la tutan mondon de la polusoj ĝis la

tropikaj arbaroj, vi ne povos vidi pli ol 10 000 speciojn de birdoj.

Do, mi komencis mian kolekton antaŭ deko da jaroj. La celo estas precize noti, kiam, kie kaj kiun birdon mi vidis, kaj tio estas facile danke al la retejo eBird. Iru viziti ĝin. Ĝi estas senpaga retejo, eĉ por membriĝi. Tre utila retejo por ekscii, kiu vidis kiujn birdojn, kie, ie ajn en la mondo. Antaŭ ol vojaĝi al nova lando, regiono, mi plej ofte esploras pri la birdoj. Fakte, eĉ dum mi vojaĝas, mi tion faras por ekscii, kion oni vidis la tagon antaŭe kaj esperi vidi la raran birdon, kiu eble troviĝis tie.

Mia kolekto rapide kreskis, ĉar mi havis la ŝanĉon vojaĝi al aliaj landoj konataj pro la birda diverseco kiel Kostariko, Ekvadoro kaj Kubo. Eble vi scivolas, kiom da birdspecioj mi vidis ĝis nun? En Kebekio mi atingis 251 speciojn, kaj en la mondo 1 085. Mi ne imagis antaŭ kelkaj jaroj, ke mi sukcesus vidi 10 elcentojn de la monda birdaro.

Irante al UK-o en alia lando, aŭ por ferioj, mi ĉiam celas malkovri samtempe birdojn. Pasintjare en Portugalio, mi malkovris 58 speciojn en aŭ ĉirkaŭ Lisbono. Kelkaj specioj estis novaj por mia kolekto. Plia ĝuo por mi dum vojaĝo. Mi certe ne konvinkis vin, iri observi birdojn, sed vi certe nun scias, kiel mi povas kolekti birdojn.

Montrealo-2020 : estu preta !

La Universala Kongreso de Esperanto venas, la unuan, al Montrealo kaj la duan fojon al Kanado ! Estu preta por semajno da amuziĝo en la koro de la urbocentro de nia belega plurlingva kaj plurkultura urbo de Nord-Ameriko ! Ni preparas por vi la plej nekredoblan programon, kun antaŭkongresoj okcidenten (ekz., Toronto, Niagaraj akvofaloj) kaj orienten (Kebeko, eĉ kun ekskursoj por spektado de balenoj !). Ni trinkos la faman glacivinon kaj glacidron, gustumos pladojn kun la fama kanada acersirolo, ni festos kaj amuziĝos en la kongresejo kaj ekstere ! La kongresejo situas apud ĉiuj vidindaĵoj kaj en la marŝa distanco ĝis la monto kaj la rivero !
Marku viajn kalendarojn: 1-8-a de aŭgusto 2020 .



La ikonaj montrealaj kurbaj ŝtuparoj

Por la Tero, ni restu surgrunde !

Francisko Lorrain

L'auteur a pris une décision en apparence surprenante pour un espérantiste. À cause de l'urgence climatique actuelle (voir le dernier rapport du GIEC), n'ayant déjà pas d'auto, il a décidé, entre autres choses, de ne plus jamais prendre l'avion, afin de limiter de manière beaucoup plus importante ses émissions de gaz à effet de serre. Cela peut sembler extrême, mais à situation extrême solutions extrêmes. Il nous présente une traduction en espéranto du manifeste « Nous ne prendrons plus l'avion » (stayontheground.org), qu'il a signé récemment.

Aŭton mi ne havas, kaj eĉ neniam havis. Sed, pro la nuna urĝa, ege riska klimata krizo, certe la unua tutgloba krizo, kiun alfrontas la homaro, mi de kelka tempo demandadis min, kion signifan mi povus fari krom tio, kion mi ĝis nun faras. Mi iun tagon kalkulis, per du malsamaj kalkuliloj (troveblaj surrete), mian ekologian « spuron », ne nur kiel nombron da tunoj da rekte aŭ malrekte eligata karbona dioksido, sed ankaŭ kiel nombron da « planedoj », kiun mia vivmaniero konsumas. Mi konstatis, ke, eĉ sen aŭto, mia sufiĉe modesta vivnivelo postulus ĉirkaŭ *du planedojn*, por ke la tuta homaro havu la saman modestan vivnivelon en daŭripova maniero ! Tiu fakto renversis min.

Sed per tiuj samaj kalkuliloj mi baldaŭ konstatis, ke la plej simpla maniero signife redukti mian ekologian spuron estus ne plu aviadili. Tio ne sufiĉas por alveni al unuplaneda ekologia spuro, sed almenaŭ ĝi estas paŝo en la bona direkto.

Mi do decidis subskribi la manifeston *Restu surgrunde* (stayontheground.org), per kiu mi promesis neniam plu aviadili. Tio povas ŝajni surpriza decido por esperantisto ! Tamen, la nuna evoluado de nia surtera klimato fariĝis tiom danĝera, ke nur per aŭdacaj, radikalaj reformoj ni sukcesos limigi la pligrandigon de la meza surtera temperaturo je 1,5 celsiaj gradoj (ekde la

antaŭindustria epoko). Tion detale klarigas la [lasta raporto](#) de la UN-a [Interregistara Spertularo pri Klimata Ŝanĝiĝo](#) (france GIEC, t.e. Groupe d'experts intergouvernemental sur l'évolution du climat, angle IPCC, t.e. Intergovernmental Panel on Climate Change).

Plurloke surtere, eĉ en Kanado, eĉ en Kebekio, oni jam suferas pro pluraj gravaj, kaj en iuj landoj gravegaj, sekvoj de la ĝisnuna temperaturaltiĝo, nun ankoraŭ malpli granda ol 1,5 gradoj ! Sed, se iam tiu altiĝo fariĝos pli ol 1,5 gradoj, atingante ekzemple 2 gradojn aŭ pli, la konsekvencoj — klimataj, agrokulturaj, akvoprovizaj, sed ankaŭ sekve sociaj, migradaj, ekonomiaj, komercaj, politikaj kaj antaŭvideble militaj — estos multe pli gravaj. Pri tio severe admonas la [menciita UN-a raporto](#), per kiu ni aldone ekscias, ke ni havas nur ĝis la jaro 2030, por povi limigi la temperaturaltiĝon je 1,5 gradoj. Nur ĝis 2030 ! Restas al ni nur 11 jaroj ! Nur du-tri kanadaj federaciaj voĉdonoj ! Imagu !

Laŭ la raporto, tia ĝustatempa limigo eblas, sed nur per aŭdacaj, kreivaj kaj tre kuraĝaj rimedoj. Krom radikala evoluigo de surteraj transportrimedoj, unu el la pluraj aliaj *necesaj* rimedoj estos grandega reduktado de aviado, ĉar ankaŭ ĉi-lastata produktas nekredeblan kvanton da

karbona dioksido, la ĉefa forceja gaso (vidu la tekston de la manifesto ĉi-sube) — kaj senforcejgasa aviado ankoraŭ tre malproksimas.

Por la homaro alvenis la tempo de gravaj decidoj. Tial mi subskribis la manifeston. Mi havas amikojn kaj parencojn en Eŭropo, sed mi ne plu vizitos ilin. Ekde nun ni renkontiĝos nur skajpe aŭ simile. Kaj, ne, mi ne plu flugos al Esperantaj kunvenoj. Ni esperantistoj devos pikinciti nian kreivon kaj elpensi ankaŭ aliajn manierojn kunveni, parte virtualajn. Kompreneble, se mia subskribo restus izolita gesto, ĝi nur sensignife reduktus la tutterajn eligaĵojn de forcejaj gasoj. Priplorinde, ĝis nun malpli ol du mil homoj subskribis tiun manifeston. Sed ĝia aŭtoro, Julien Goguel, ne havas grandajn rimedojn por reklami ĝin, kaj ekzistas ankaŭ aliaj samcelaj retejoj kaj organizaĵoj, pri kiuj cetere vi povas informiĝi ĉe la sama [stayontheground.org](#).

Mia decido povas ŝajni ekstrema. Sed, laŭ mi, ĝi estas nur necesa. Situacio ekstrema alvokas solvojn ekstremajn ! Cetere, se ni ne decidus tion mem, estontece aŭ registaraj limigoj de forcejgasa eligado (espereble baldaŭaj), aŭ la kruela realo devigos nin preskaŭ ne plu aviadi.

Kaj estu konscia, ke tio estas nur unu el multaj necesaj, malfacilaj venontaj fundaj ŝanĝoj en nia

vivmaniero, en niaj socioj, en la tutmonda socio. Vi eble aŭdis pri tiu kuraĝa 16-jara junulino, [Greta Thunberg](#), kiu lastnovembre komencis ĉiuvendrede striki por la klimato antaŭ la sveda parlamentejo. Indas aŭskulti la anglalingvan [TED-prelegon](#), kiun ŝi faris lastjare en Stokholmo. Aŭskultu same ŝian sobriĝan [lastdecembran elpaŝon](#) ĉe COP24 en Katowice (Pollando).

Dependas de ni, ĉu la venontaj neeviteblaj ŝanĝoj fariĝos kiel eble plej konscie kaj kunlabore, aŭ ĉu ili fariĝos katastrofe, kaj tiam sendube do-lor-eg-e.

Tamen ne vidu ĉion tion nur negative. Fakte nia nuna drama, korprenema situacio konsistigas nekredeblan oportunion komenci transiri al monda socio pli harmonie rilatanta kun la naturo kaj samtempe, nedisigeble, iom pli justa kaj humana ! Nedisigeble, simple ĉar

vere naturprotekta socio ne plu povas baziĝi sur la nuna plejsankta principo pri senfina, ĉiapreza kreskado ! Pripensu tion ! Nura revo ? Eble, sed, kiu scias, eble ne. La historio foje surprizas. Sed, kiel ajn, io certas : la postaj generacioj aŭ nin benos, aŭ nin malbenos — ili ne indiferentos.


Kiun rolon povus ludi Esperanto en la venonta

transiro ? Certe pozitivan, kio ajn okazos. Tial mi decidis esperantigi la priparolatan manifeston, kiu mem bone pluklarigas, kial aviado estas destinita multege reduktiĝi.

Mi invitas vin

alklaki la entekstajn ligojn, ege instruajn : vi tiel malkovros nekredeblajn faktojn. Kanadanoj, preparu vin por ŝoko !

Flugdistancoj haveblas [ĉi tie](#). Notu, ke en la manifesto ĉiuj nombraj donitaĵoj estis rondigitaj.



NI NE PLU VETUROS PER AVIADILO

*Opinia teksto publikigita de Julien Goguel ĉe liberation.fr,
tradukita de F. Lorrain*

COP21, COP22, COP23, COP24... Ekde la unua konferenco en Berlino pri la klimataj ŝanĝoj en 1995, internaciaj renkontiĝoj sekvas unuj la aliajn, la spertuloj terurigas, la popoloj ekkonsciadas pri la graveco de la problemo, kaj ĉiu tago iomete pliproksimigas nin al la senrevena scenaro. La homa specio estos kapablinta savi siajn bankojn, sed ne sian vivlokon.

La klimato plivarmiĝas, kio sekvigas la konatajn katastrofojn kaj tiujn venontajn, eĉ pli grandajn. Tial ni hodiaŭ decidis fari elekton : **ni ne plu veturos per aviadilo.**

POR REDUKTI NIAN KONTRIBUON AL LA KLIMATA ŜANĜO

Transportado respondecas pri 20 % de la tutmondaj karbondioksidadaj eligaĵoj. Redukti nian uzadon de transportado reduktas la kvanton da karbona dioksido, kiun ni eligas, nemalhavebla kondiĉo por esperi limigi la plivarmigon de la klimato. [Unu kilometro traირita aviadile eligas double pli ol unu kilometro traირita aŭte](#). Tiurilate la diferenco ne malgrandas, sed tamen ne grandegas. La ĉefa diferenco kuŝas en la ĝenerale nekompareblaj traირitaj distancoj. Neniu eĉ imagas aŭti 12 000 kilometrojn por unusemajna feriado.

[Ĉiu franco eligas po 5 tunoj da CO₂ ĉiujare. Unu ira kaj reira vojaĝo inter Parizo kaj Nov-Jorko eligas po 2 tunoj por ĉiu pasaĝero](#). Kalkulu mem : se ekiri el Parizo, unusemajnaj ferioj en Balio preskaŭ same efikas je la klimato ol unu vivjaro en Francujo (ĉiutagaj veturoj por labori, hejtado,

elektro, nutrado ktp).

Ne plu veturi per aviadilo nuligas grandegan koston por la klimato.

POR ESTI KOHERAJ

Ni ĉiutage strebas limigi nian efikon je la medio kaj redukti nian « karbonan spuron ». Ni kunveturadas, ni malpli hejtadas, ni izolas niajn loĝejojn, ni anstataŭigas niajn aŭtojn per elektraj bicikloj, kiam ni povas. Ĉiuj klopodoj, kiujn ni faras dum unu jaro, ruiniĝas tuj, ekde kiam ni enaviadilas por longa flugo.

Se ni konsumas lokajn fruktojn, tial ke nov-zelanda kivo vendita en Francujo ŝajnas al ni freneza, ni ne ĉion fuŝu vojaĝante per aviadilo por ferii. Ne plu aviadili signifas ligi niajn agojn al niaj paroloj.

POR INAŬGURI NOVAN ERAON

Kun la okuloj tute malfermitaj, ni deklaras hodiaŭ, ke teleporti sin en kelkaj horoj je kelkmilkilometra distanco estas revo de la pasinteco. Morgaŭ, tio fariĝos senrespondeca.

Ni proponas rekoncepti nian rilaton al alilokeco kaj vojaĝado. La aviadilo abolis la distancojn, ĉu ? Ni restaŭru ilin. Al la kulto al rapideco ni kontraŭmetas la laŭdadon de malrapideco. Jam finiĝas la epoko, en kiu oni saltis al alia kontinento por nura feriado. La teknologio kaj komercaj ofertoj ankoraŭ permesas tion, sed la racio ekde nun malpermesas ĝin. Ni vojaĝu proksime de nia hejmo. Ankaŭ tuj apude estas lokoj, en kiuj ni povas sperti « alilokecon ». Kaj, se ni volas iri pli for, ni antaŭvidu sufiĉan tempon por iri tien malrapide, bicikle, velbarke, velŝipe, aŭ piede.

Ne plu veturi per aviadilo signifas esti viziulo.

Nord-amerike kaj senaŭte

Jenja Amis

Esti redaktoro de *La Riverego*, aŭ iu ajn alia revuo, donas al vi almenaŭ unu avantaĝon : vi povas legi la artikolojn antaŭ ol ili publikiĝas. Vi havas ankaŭ (eble, iom maljustan) avantaĝon respondi, antaŭ ol ĉiuj aliaj povas. Mi anticipe pardonpetas pro tio, ke mi, eble, misuzas tiun ĉi redaktoran avantaĝon por respondi al la artikolo de Francisko, kara amiko kaj provlegisto de *La Riverego*, pri lia decido surgrundiĝi.

Mi sentis malfacilon, leginte la artikolon, ĉar kiel homo, kiu de tempo al tempo flugas (kaj ne vidas manieron ĉesi) kaj kiu vole-nevole partoprenas en la okcidentstila vivmaniero, ankaŭ mi kulpas pri la detruo de nia medio. Ni aĉetas tro da aĵoj pakitaj kun tro da plasto ; ni manĝas en rapidmanĝejoj kun ĵetebraj iloj ; ni uzas unufojajn paperajn tukojn, kiujn oni eble produktis el arboj el Amazonio ; ni uzas tro da aparatoj, kiuj konsumas tro da elektro ; ni senpripense uzas interreton kaj serĉilojn, eĉ ne pensante, kiom da elektro necesis por unu Google-serĉo. Ni aŭtas (plejparte eĉ sole), busas kaj (jes...) ni aviadilas. Mi diras « ni » kiel socio, ĉar, eĉ se kelkaj el ni kiel individuoj ne faras iun el la supraj aferoj, ni tamen iel kontribuas al tiu kolektiva detrua ago per aliaj manieroj, simple

ĉar ni ne povas tute ignori nian, damnan, sed ŝajne, neeviteblan okcidentan medion, kie oni kreis la ideon, ke feliĉo atingeblas per la kvanto da aĉetitaj varoj, kaj la homo valoras tiom, kiom li aŭ ŝi povas aĉeti kaj konsumi...

Pensi pri ĉio ĉi estas ekstreme deprime, ĉar oni (almenaŭ mi) sentas sin senpova en tiu ĉi freneza maŝino, kiu baziĝas sur freneza ideo, ke la kresko estas senlima, kio fariĝis la bazo de nia kapitalisma socio (aŭ eble eĉ ideologio). Tiom deprime, kiom ĝi estas, estas absolute necese pensi pri ĉio ĉi, kaj agi tiom, kiom eblas, kaj rezisti. Sed estas diversaj manieroj rezisti kaj, laŭ niaj ebloj, redirekti niajn agojn, kaj ĉiuj manieroj estas bonaj. Por kelkaj tiu maniero estas resti surgrunde (kio funkcias por iuj, kaj por aliaj ne), por aliaj (kiel

mi, kiu daŭre flugos, aparte por partopreni en Esperanto-aranĝoj), tio estas aliaj manieroj – kaj ĉiuj ili (kaj ilia kombinaĵo !) estas bonaj. Por iuj tio estas ne aŭti, ne manĝi plej poluajn produktojn (por iuj tio estas nelokaj produktoj ; por aliaj, certaj viandoj, aŭ eĉ ĉiuj viandoj), ne uzi elektron, kiam eblas eviti tion (por sekigi vestaĵojn, ekzemple), eviti plastaĵojn kiel eble, ne tro hejti aŭ malvarmigi la loĝejon, partopreni en la komunumaj purigotagoj, informi, konsciigi, inspiri amikojn – la listo senlimas – kaj, eble plej grave, elekti politikistojn kun « verdaj » programoj. Mia maniero rezisti estas vivi sen aŭto...

Laŭ la usona ekologia agentejo EPA, averaĝa aŭto en Usono (kaj, mi pensus, simile en Kanado) produktas ĉ. 4,6 tunojn da karbona dioksido ĉiujare. (Mi ankaŭ rapide faris kalkulon laŭ footprintcalculator.org por vidi, ĉu tio pli-malpli similas, rilate al la situo de la (iom fora)



laborejo de mia edzo, se li *uzus* aŭton [li uzas la publikan transporton] kaj tiel pli-malpli estus.) Se vi estas average loĝanto en Nord-Ameriko, kiu ŝoforas, kaj decidas unufoje jare flugi de unu marbordo al la alia, vi fakte en unu flugo (tien kaj reen) faras ĉ. 20% de via ĉiujara aŭta damaĝo. Tio

estas multe, sed tamen, malgraŭ ĉio, vivi senaŭte kaj foje flugi estas pli ekologia ol vivi kunaŭte kaj neniam flugi (pardonu troan simpligon, ĉio, kompreneble, dependas de multaj aliaj aferoj – distancoj, kiom plena estas via aŭto kaj la aviadilo, ktp.).

Nia decido vivi senaŭte estis tre intenca kaj zorge planita (mi devas diri, ne ĉiam komprenata de amikoj kaj la familio), sed ni estis bonŝancaj vivi en urboj, kie fakte tio eblas (ja ne en ĉiuj partoj de Nord-Ameriko vivi senaŭte eĉ eblas). En la regiono, de kie devenas mia edzo –

granda Atlanto (Georgio) –, ĉiu familio havas du aŭtojn, foje pli, ĉar senaŭte oni ne povas iri eĉ ĝis la plej proksima vendejo, kaj piediraj vojoj ofte ne estas eĉ en la urbo, ne parolante pri la kamparo aŭ antaŭurbo. Ni elektis vivi senaŭte en la urbocentro de Atlanto, kie prezoj por lui apartamenton estas pli altaj ol en antaŭurboj, sed kie ekzistas publika transporto – certe, ne ideala, tamen funkcia. Mi memoras, ke iam koleginino mia, kiu lernis, ke mi ne ŝoforas (nek iam ajn ŝoforis), volis fari foton kun mi, dirante, ke mi estas la unua homo, kiun ŝi konas, kiu ne ŝoforas.

Nia situacio malboniĝis, kiam mia laborejo translokiĝis de

la urbocentro al tre fora antaŭurbo, kien eĉ ne iris publika transporto (jes, oni translokiĝis al loko, kien ne iris publika transporto, eĉ ne pripensante, ĉu estas laborantoj, kiuj ne ŝoforas...). Mi devis do ne nur busi kaj trajni, sed ankaŭ kunveturi aŭte kun unu el miaj kolegoj, ĉiumatene kaj ĉiuvespere, pli ol 1,5 horojn en unu direkto, sen maniero eliri meze de la tago. Tiu situacio kaŭzis



al mi enorman streson, kaj fine mi ankaŭ perdis la sanon. La situacio ne estis eltenebla, kaj ni komencis pripensi pri translokiĝo. De tio venis la ideo translokiĝi al Montrealo, urbo kun bonega transporto, en la lando multe pli progresema en diversaj aliaj manieroj (politike, socie).

Retrorigardante, tio estis unu el la plej bonaj decidoj por nia familio, eĉ se Usono perdis en ni du ekologiemiajn « maldekstrulojn ». Sed tiel estas...

Dum ni loĝis en Usono, mi konstatis ne nur kiom aŭtocentra estas la socio, sed ankaŭ ĝis kiu grado oni malŝparas energion en aliaj manieroj – ekzemple, pro troa hejtado kaj klimatizado

de domoj kaj laborejoj. Ie mi legis, ke por malvarmigi la domojn en Usono oni uzas tiom da energio, kiom la tuta kontinento de Afriko uzas por ĉiuj bezonoj, hejmaj kaj industriaj. Nur por doni etan ekzemplon : en mia laborejo en Atlanto – kaj ne estis Walmart aŭ Exxon Mobile, estis, fakte, la Usona Ruĝa Kruco – oni malvarmigis la temperaturon ĝis proksimume 16 gradoj

enĉambre, dum ekstere varmegis je preskaŭ +40... La laboreja mikroklimato estis ĝis tia grado neeltenebla, ke mi ĉiam devis porti dikan puloveron, kaj kelkaj el miaj kunlaborantinoj alportis etan hejtilon por varmigi sian parton de la kubiklo... jes, vi ne mislegis ! Oni *malvarmegigis* la temperaturon en la ejo ĝis neelteneble kaj tiam laborantoj *revarmigis* ĝin !

Mi ankaŭ ie legis, ke la formulo por la temperaturo en la konstruaĵoj estis farita en la 60-aj jaroj, kiam en la laborejoj preskaŭ ne estis virinoj (kaj la virinoj kutime spertas komforton je pli varma temperaturo ol viroj), kaj en la tempo, kiam ĉiuj laborantaj viroj portis longmanikajn ĉemizojn kaj jakojn... Kaj en la busoj estas simile – vintre oni varmigas ilin ĝis oni preskaŭ svenas pro varmeo, kaj somere malvarmigas ilin ĝis frostoj.

Kiam ni vizitis Japanion, iom post la katastrofo de la atomcentralo en Fukuŝimo, ni rimarkis, ke ofte la klimatizado en la ejoj estas je minimumo – ĝi estas, kaj faras sian aferon, sen troigi. Ofte en la transporto estas nur duono de la lampoj, anstataŭ ĉiuj – kaj vi komprenas, ke tio plene sufiĉas... Mi timas, ke en Nord-Ameriko (aparte en Usono) oni ankoraŭ ne komprenis la koncepton de modereco, sufiĉo kaj neceso.

Aviadiloj poluas, jes... sed ankaŭ multaj aliaj aferoj, ligitaj al nia okcidenta vivmaniero. Malgrandigi la poluadon en ĉiuj aspektoj, per la uzado de kolektiva transporto, evito de absolute nenecesaj malŝparoj kaj ekstravagancaj luksaĵoj (ekz., sekigi vestaĵojn en sekigilo dum ekstere varmegas), reduktado de plasto, reuzado de la ujoj (bonŝance, la kvanto da senplastaj vendejoj kreskegas, almenaŭ en Montrealo), malpezigo de elektrokonsumo, riparoj anstataŭ aĉeto de novaj aĵoj, kunporto de siaj propraj manĝiloj al rapidmanĝejoj, reuzo de tukoj en hoteloj, kaj, jes, malgrandigo de aviadila poluado – ĉio ĉi kalkuliĝas !

Ni ankaŭ devas « elkreski » el la iluzio de la « eterna kreskado » al la pensado pri la finiteco de la rimedoj, kaj ni devas elekti reprezentantojn ĉe la registaro, kiuj pensas same... Nur tiel, anstataŭ esti « kunpekuloj » en la detruo de nia mondo, ni fariĝos kunrespondeculaj aguloj por la bonfarto ne nur de ni, homoj, sed ankaŭ por ĉiuj bestoj kaj ĉiuj plantoj de nia bela planedo !



Pli ekologia vivstilo : ĝi ja atingeblas !

Ryan Callahan

La amaskomunikiloj dominantaj estas plenaj je malbonaj novaĵoj : ĝis 2050 povus esti pli da plasto en la oceanoj ol da fiŝoj. Ni havas 11 jarojn por haltigi la plej gravajn efikojn de la klimatsanĝiĝo. Sed kio okazus, se ni pensus pri tio, kion povas fari normala persono ? En ĉi tiu artikolo, mi ŝatus doni kvar praktikajn konsiletojn por redukti viajn rubaĵojn kaj vivi pli ekologie.

1. Rigardu en vian dorsosakon aŭ en vian monujon. Ĉu vi ne havas broŝurojn, vizitokartojn, kuponojn ? Multe el tio, kion ni ĵetas en la rubujon, ni ekde la komenco ne volas ! Ni devas lerni rifuzi rubaĵojn. Ni povas diri ne al senpagaj skribiloj de iuj grandaj markoj, kiujn ni forgesas kaj trovas unu jaron poste. En Montrealo, multaj personoj metas 'pas de circulaires'-glumarkon sur la pordon por eviti, ke la rubaĵoj eĉ eniru ilian vivon. Tiel, ili ne devas zorgi pri la forigo de la rubaĵoj, kio estas sufiĉe

komplika en si mem.

2. Vi certe rimarkis, ke en vendejoj preskaŭ ĉio estas plaste pakata. Kelkfoje, tio estas neevitebla. Do kiel kontraŭbatali ĉi tiun fenomenon ? Per la reduktado de nia konsumado. Laŭ *Forbes*, usonanoj konsumas pli ol la duoblon de la

produktoj, kiujn ili konsumis antaŭ 50 jaroj. Ĉi ĉio postulas produktadon, kiu konsumas naturajn rimedojn. Plie, multaj produktoj devos esti iam forĵetataj – kaj kien oni metos ilin ? Pli ekologia estas la interŝanĝado de tio, kion oni volas, kaj tio,

kion oni bezonas. Laŭmodaj vestaĵoj facile troveblas en karitataj vendejoj. Eĉ manĝaĵojn kaj meblojn oni povas savi de la rubujo : ekzistas multaj Facebook-grupoj por tiu celo en Montrealo, ekz. *Montreal Queer Food Exchange* aŭ *FREE STUFF Montreal*. Reuzado ŝparas rimedojn kaj helpas la medion.



3. Alia maniero ŝpari naturajn rimedojn estas reuzi tion, kion vi jam posedas. Ĝi reduktas la mendadon de novaj produktoj, kiuj estos verŝajne kovrataj per plasto kaj finiĝos en maro aŭ rubodeponejo. Eĉ se vi trovas produkton sen plasto, ĝia manufakturado estas uzinta multajn rimedojn (ekz. kupron kaj arĝenton en elektronikaĵoj). Ne nur la medio, sed ankaŭ vi persone ŝparos rimedojn, spacon kaj monon, se vi reuzos tion, kion vi jam havas. Ofte, la plej bonaj solvoj estas tiuj, kiujn havis niaj prauloj : uzi poŝtukon el teksaĵo anstataŭ papertukon, fari teon el loza miksaĵo anstataŭ per forĵetebla tesako. Alia facila ŝanĝo estas uzi sakon el juto anstataŭ unufoje-uzata plasta sako, ekzemple.

4. Fine, ni devas lerni, kion fari, kiam produkto atingis sian vivofinon. Kiam vi volas liberigi vin de iu produkto, vi povas uzi la programeton *Ça va ou* por ekscii, ĉu ĝi en via urbo estas recikligebla. Ĉi tio malhelpus la dezirrecikligadon (angle *wishcycling*), t.e. kiam personoj ĵetas ne-

recikligeblaĵojn en la recikligujon. Nune, la reciklujoj enhavas pajlojn, kafotasojn, manĝaĵojn, ktp, kiuj ne estas recikligeblaj. Tio « infektas », por tiel diri, la ŝarĝojn da reckligaĵoj, kiuj devas esti vendataj, se ni ne volas ĵeti ilin en rubodeponejon. Recikligado funkcias tiel, ke urbo kolektas objektojn, kiuj estas parte klasataj kaj tiam vendataj al firmaoj, ofte el pli malriĉaj

landoj, kiuj tiam faras el ili novajn produktojn.

Bedaŭrinde, la proporcio de tia « infektado » en Kanado kaj multaj aliaj landoj estas tiom alta, ke Ĉinio, antaŭe la plej granda aĉetanto de reckligaĵoj, ne plu akceptas reckligaĵojn el nia lando. Fine, estas grave scii, ke multaj materialoj, ekz. papero aŭ plasto, povas esti reckligataj nur kelkajn fojojn, antaŭ ol ili devas finiĝi en rubodeponejo.

Do tial ni devas koncentriĝi pri

la kvar unuaj konsiletoj : reckligado estas nur parto de la solvo. Se vi sekvos ĉi tiujn konsiletojn, vi estos jam sur bona vojo al ekologie pravigebla vivstilo !



Ĉiu rubaĵo de la aŭtoro (Riano) por januaro 2018

Malpli oftaj fundamentaj vortoj 9

Francisko Lorrain

Iam kaj tiam oni renkontas fundamentan radikon, kiun ni povus pli ofte uzi. Jen la oka ero de kroniko prezentanta ĉiufoje kelkajn malpli ofte uzatajn fundamentajn radikojn. La difinoj kaj ekzemploj estas ĉerpitaj el *La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto* (Paris, Sennacieca Asocio Tutmonda), kiu markas ĉiujn fundamentajn vortojn per stelo ★. Komentoj miaj aperas inter rektaj krampoj []. Alta ^Z indikas zamenhofan citaĵon aŭ vorton.

★ **drapir/i** (tr) **1** Ornami, kovri per multfaldaj pendanta ŝtofo : *~i liton, fenestron* ; *la grekaj statuoj estas admirinde ~itaj* ; *la ~aĵoj de solena estrado* ; (f) *la ĉielo subite ~iĝis per malhelaj nuboj*. **2** Harmonie aranĝi la faldojn de vesto : *~i tunikon, jupon* ; *lia rajdmantelo montris plej zorgan ~adon^Z* ; *la ~aĵo de robo, de teatra kurteno*.

★ **ekzerc/i** (tr) Lertigi per ripetata praktikado : *~i soldatojn* ; *sin ~i en parolado^Z* ; *~i sian oreton^Z* , *sian langon, muskolojn, fingrojn*. ☞ *dresi, trejni, hardi*. RIM. Neĝuste estas uzi kiel objekton de **ekzerci** la temon de la ~ado : oni ne « ~as sian piecon », sed « ~as sin al pieco »^N. ~iĝi. Sin ~i : *ili denove diligente ~iĝis^Z* ; *~iĝi en E-a parolado^Z*. [Oni ne malofte aŭdas malĝustajn frazojn kiel « mi ~as ĉiutage », anstataŭ « mi ~iĝas ĉiutage.]

★ **erp/i** (tr) Skrapi kampon, disrompante la terbulojn per tiucela instrumento : *ĉu vi povas alligi bubalon, ĉu ĝi ~os post vi valojn ?^Z* ; (f) *~i la maron^Z* (provi neblan aŭ vanan, senefikan faron). ~ilo. Fera denta [aŭ diska] instrumento por ~i. [France, « herser ». Laŭ spertuloj tiu radiko devenus de la itala « erpicare ».]

★ **etat/o**. Oficiala tabelo, montranta, je difinita dato, la detalan elnombradon de ĉiuj elementoj de kompleksaĵo : *financa ~o de entrepreno* ; *~o de la elspezoj de komunumo, de la oficistaro de ministerio* ; *~o de la vunditoj k mortigitoj en la regimento* ; *~o de la salajroj en la privata industrio* ; *~o de la ĉeestantaj studentoj, de la ŝipanoj* ; *forstrekita el la ~o* (fordungita, eksigita ks). ☞ *buĝeto, listo, kiomo*. **ekster~a**. Ekstra, ne enkalkulita en la koncerna ~o. **bien~o**. Katastro.

(daŭrigota)

30 jarojn poste, aŭ : bela revido

Zdravka Metz

Antaŭ multaj jaroj, kiam niaj infanoj estis malgrandaj denaskuloj, en 1989, Esperantisto el Los Angeles skribis al ni : « Mi devenas de Koreio same kiel mia edzino. Ni decidis, ke Monika, mia edzino, parolu koree al niaj du infanoj, kaj mi nur en Esperanto. Ili jam bone parolas, kaj ni ŝatus familie viziti vin, ĉar ni vojaĝos al orienta Usono por geedziĝfestoj, kaj mia amiko pruntedonos al ni aŭton, tiel ke ni povu viziti vin, en Kanado. »

« Kompreneble, vi nepre venu kaj restu dum kelkaj tagoj ; por ni estos plezuro konatiĝi kun vi en Montrealo, estis nia respondo. »

Kaj la amika, internacia, amuza kaj dufamilia renkontiĝo okazis. Niaj infanoj interparolis en Esperanto, ludis en la sablo, kuris tra vizitataj parkoj, ridis kaj amuziĝis dum tri

tagoj ; tiom daŭris la renkontiĝo.

La familio donacis al ni murhorloĝon, kiun ni pendigis en la kuirejo, kaj tiel ĝi akompanis nin ĉiutage, montrante, kiel rapide pasas la tempo.

Poste, ĉiuj vivis kun grandiĝantaj infanoj kaj kun niaj ĉiutagaj familiaj plezuroj, taskoj kaj devoj. Ni havis ĉiam pli da jaroj, maljuniĝadis, emeritiĝis, sed samtempe ni fariĝis pli liberaj por vojaĝi.

Pasintan jaron ni partoprenis, en Kubo, la Tutamerikan Kongreson de Esperanto (TAKE). Vi povas imagi, kian grandan ĝojon ni havis, kiam ni revidis niajn koreajn geamikojn, Monika-n kaj

Wongill-n. Bonŝance, ni havis ne nur kongresan semajnon, sed ankaŭ postkongresan vojaĝon por kune travivi kaj interparoli pri niaj grandaj infanoj.



Niaj denaskuloj ne uzas internacian lingvon ĉiutage, tamen daŭre kapablas ne nur kompreni, sed ankaŭ respondi kaj uzi la lingvon.

Ni promesis al la familio ke ni, vizitonte la fratinton de Normando, kiu loĝas en San Diego, certe skribos al ili kaj nepre vizitos ilin.

Ni ĵus revenis de Kalifornio, kaj dum tiu vojaĝo ni jes plenumis nian promeson. Ĉi-foje estis la bofrato, kiu pruntedonis al ni aŭton, kaj ni semajnfine vizitis Monikan-n kaj Wongill-n en Laguna Hills, unu el la sudaj urbetoj de grandega Los Angeles.

Kompreneble, la du infanoj, nun jam plenkreskuloj, forlasis la neston unue por studi, kaj poste trovis laboron, geedziĝis, fariĝis gepatroj : Steleto en San Francisko kaj Emilo en Los Angeles.

Ni ne povis revidi denaskulojn, sed nia tempo kun niaj similaĝaj geamikoj estis plezura, riĉiga je pliaj konoj pri ili ; tiu revido restis neforgeseble bela.

Kiel emerituloj ni ĉiuj havas niajn interesojn, kiuj foje tre similas. Ili interesiĝas pri birdoj kaj instalas manĝilojn en sia korto, ĵus antaŭ la fenestro. Ili nutras ilin per framba konfitaĵo, kaj birdoj venas manĝi. Tiel ni ankaŭ povis vidi dum niaj pluraj manĝoj : kolibron alanan, flavan oriolon,

poliglota mokbirdon grizan, ruĝetan domfringon.

Ni volis promeni tra apudaj parkoj por vidi aliajn kaliforniajn birdojn. Wongill gvidis nin tuj, kun granda intereso, al apuda parko, kiun li vizitas ĉiutage. Li prizorgas du birddometojn por bluaj merloj, raportas pri kovado sukcesa aŭ ne. Li nepre volis montri tion al ni.

Normando, kiu observadas birdojn ne nur en nia korto, sed ekskursas kaj vojaĝas por trovi, vidi kaj rekoni novajn lokajn speciojn, estis tre feliĉa. Ankaŭ li kun siaj ornitologiaj geamikoj prizorgas dometojn por kelkaj specioj de birdoj kun celo helpi nestadon. Li tuj rimarkis plurajn parojn de bluaj merloj kaj konsilis al Wongill ke, pro sufiĉa spaco en tiuj du parkoj, oni povus meti po almenaŭ du aŭ tri pliajn dometojn.

Trioje ni vizitadis kaj promenadis en vendreda posttagmezo, sabata mateno kaj parto de la posttagmezo. Ni vidis kverkan pegon, dormantan gufon, familion de egiptaj anasoj kun kvar idoj, kaj multajn aliajn birdojn.

Dume, Monika vizitis kaj prizorgis siajn maljunajn gepatrojn kaj kun ŝi ni denove renkontiĝis endome. Ŝiaj spertaj manoj jam prizorgis vespermanĝon, kaj la domo bonodoris je hejma kuirado. Bongustege. Ni tostis je nia sano kaj

longdaŭra amikeco trinkante meksikan bieron, poste dum la manĝo kalifornian ruĝan vinon kaj fine dum deserto kebekian pomvinon.

La temoj de agrabla interparolado dependis de demandoj, kiuj venadis de ĉiuj ni. Ni scivolis pri teuoj de Monika, unu de ŝiaj kolektaĵoj, kiuj laŭ sia grandeco, valoro, koloro aŭ kulturo trovis sian lokon en vitraj ŝrankoj aŭ bretoj.

Wongill montris al ni sian riĉan kolekton de funkciantaj murhorloĝoj el diversaj landoj, sian hejman atelieron kun eĉ pli da horloĝoj, kiuj ankoraŭ bezonas liajn konojn kaj lertajn manojn. Inter ili impresis nin unu horloĝo, kiu nur funkcias per ŝanĝiĝo de temperaturoj taga kaj nokta.

Ĉu vi povus imagi, ke li sukcesis kunigi horloĝon dispecigitan en multaj pecoj, kvazaŭ ĝi estus puzzle de lignaj kaj metalaj pecoj? Li bezonis tempon: du jaroj da pacienco, volo, persista deziro vidi ies familian horloĝon, kunigitan kaj funkciantan.

Li ne estas ordinara horloĝisto, li estas scivolema, aŭskultema, sentema kaj nepre tre plena por sia metio, kiun li lernis de sia patro kaj kiun li daŭrigas hejme kiam li volas ludi.

Ĉiu horloĝo havas sian rakonton, kaj estas interese, ke nia amiko komencis noti homajn, aparte interesajn vivrakontojn kaj nun jam havas

kolekton de pli ol tridek skribitaj rakontoj en la korea lingvo.

Kelkajn li rakontis al ni, kaj nur la racia ekrigardo al horloĝo ĉesigis nian senĉesajn vesperajn kaj agrablajn babiladojn.

Dimanĉan matenon, niaj gastigantoj proponis al ni, ke ni nepre kune vizitu la Mision San Juan Capistrano, malnovan historian urbeton fonditan en 1776, kun du preĝejoj. Ĝi estas la heredaĵo de Junipero Serra, hispandevena franciskano. Li unue venis Meksikion kaj laboris instruante filozofion en kolegio. Poste li akceptis esti misiisto kaj fondis dek misiojn. Hodiaŭ urboj en alta norda Kalifornio estis fonditaj de li, komence de San Diego, en 1769. Oni konsideras lin kiel la patron de Kalifornio, kaj lia statuo troviĝas en Vaŝingtono.

Bedaŭrinde ni devis rapide saluti karajn geamikojn, ĉar ni diris al familianoj, ke ni alvenos por la dimanĉa tagmanĝo en alia urbo meze de dezerto.

Nun estas niaj geamikoj, kiuj promesis al ni partopreni Montrealan UK-on en 2020 kaj poste resti en Kebekio por viziti nin en Granbio.

Tiam ni montros al ili niajn manĝilojn por birdoj, niajn birdojn kaj la naturejon ĉe la lago, kie ni volontulas.

Granda timo

Zdravka Metz



Ĉu vi iam multe timis ? Vere, mi iam ne nur timis, sed timegis.

Tio ja okazis al mi dum vojaĝo antaŭ du jaroj. Ni vizitis najbaran landon, Usonon. Kiam oni vojaĝas tien, estas certaj malpermesoj, kiujn oni devas respekti. Oni ne rajtas porti enlanden bestajn produktojn, aŭ ĝenerale manĝaĵojn kiel fruktoj kaj legomoj.

Nia vojaĝo planita estis viziti Floridon dum tri semajnoj. Mi kunportis ĉokoladon, sunflorajn salumitajn semojn, sekigitajn fruktojn, sekajn nedolĉajn kuketojn kaj migdalojn. Kiam oni veturas aviadile, preskaŭ ĉiuj flugkompanioj servas al vi neniun manĝon, sed nur saketon de sekaj kuketoj aŭ simile, glason da suko aŭ alian trinkaĵon.

Estis tre frua mateno, fakte ankoraŭ la nokto, kiam ni forlasis la domon kaj taksie veturis al la flughaveno. Pli ol du hora atendado por transiri la usonan doganejon en Montrealo. Jes, en Montrealo, eĉ ne forlasante la flughavenon, oni eniras usonan kontrolejon, en kiu doganisto kontrolas nian pasporton, antaŭ ol ni eniros la

aviadilon.

La vojaĝo kvarhora tro longas por nenion manĝi. Pro tio ni kunportis sandviĉojn. Ni enviciĝis tuj. Estis antaŭ la kvara matene, kaj la oficistoj malfermis la doganon nur je la kvina matene. Tamen multaj flugoj foriras frue al Usono, kaj estiĝas tro longaj vicoj de vojaĝantoj. Tiel ni eĉ malfruis por nia flugo. Ni akceptis flugi ne rekte, sed per alia ebla vojo por atingi la urbon Miami.

Dum ni vojaĝis, ni malsatis kaj manĝis niajn sandviĉojn, kaj en posttagmezaj horoj ni atingis Miamion.

Atendante nian valizon, mi rimarkis hundon, kiu flaras sakojn kaj valizojn de vojaĝantoj. Mi kredis, ke la hundoj estas trejnita por trovi drogon, sed mia amiko diris : « Krom la drogon ili serĉas ankaŭ manĝaĵon aŭ ion malpermesatan. »

Mi eksentis timon, kaj mia amiko proponis al mi, ke mi sidiĝu kelkan tempon, dum kiu li mem atendas nian valizon.

Mi sidis fermante la okulojn por trankviliĝi. Subite mi aŭdis la rapidan marŝ-glitadon de la hundo sur

la betona glita planko kaj hundan spiradon proksime de mi. La policano gvidis ĝin per kondukrimeno kaj lasis ĝin flari ĉion. La hundo foje saltis sur muron, kie estis fajro-estingilo. La policano tiris la kondukilon. Mia dorso-sako enhavis sakon de sunfloraj semoj kaj migdaloj, kaj nutrajn stangetojn. Ili estas unuope pakitaj. Mi tenis mian dorso-sakon sur mia dorso kaj nekomforte sidis tiel sur la seĝo. Mi timegis pensante : ĉu la hundo venos sidiĝi apud mi ?

La hundo flaris ĉie kaj foriris kun la policano. Mia amiko, ricevinte nian valizon, volis serĉi urbo-mapon kaj lasis al mi la valizon kaj sian pezan sakon. Mi akceptis kaj restis samloke. Mi atendis longe. Kvin minutojn poste, mi aŭdis fortan kaj rapidan bestan spiradon. Ve ! Denove la hundo kun policano. La besto tiris dekstren, maldekstren, saltis sur muron, preterpasis min. Mi aktoris, kvazaŭ mi profunde dormus, sed timegis, kaj tra duonfermitaj okuloj mi vidis la hundon flari ĉie. Du-, trifoje ĝi pasis ĉirkaŭ mi kaj foriris. Mi feliĉis, ke la hundo ne eksidiĝis apud mi. Mi volis foriri de



tiu loko, kie alvenadas valizoj kaj vojaĝantoj... Tro danĝera loko por mi nunmomente.

Kiam mi aŭdis la trian fojon la hundan spiradon, ŝajnis al mi, ke mi povus pli facile morti ol esti malkovrita. Mi provis imagi tiujn, kiuj kaŝe portas drogon... Ĉu ili timus kiel mi, aŭ ili entute ne havus similajn sentojn ? Ĉu ili mem estus drogitaj por ne senti tiun malagraban senton, la timon ?

Mia amiko alvenis kaj vidis min kun fermitaj okuloj. Li pensis, ke mi ekdormis pro matena frua vekigo. Rimarkinte lian alvenon, mi feliĉis vidi lin

kaj tuj diris : « Mi ne dormas. Ni foriru de ĉi tie. Mi petas, iru ni for, kiel eble plej rapide, ĉar mi ne plu povas elteni tiun timegon. Ni parolu en iu alia loko. »

Mia amiko vidis, ke mi vere tremas de timo, de laciĝo, aŭ malvarmo. Jes, en tiu loko oni

malvarmigis la aeron, kvazaŭ por ke la laboristoj ne sentu la someran varmegon, malgraŭ ke jam estis la lasta tago de oktobro. Estas certe, ke venontfoje mi pripensos, kion mi kunportu por vojaĝo al la najbara lando.

Louis FRÉCHETTE

Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado



Kun la originalaj ilustraĵoj de
Frederick Simpson COBURN

ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA

Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado : papere aŭ elektronike!

Ses kristnaskaj rakontoj de [Louis FRÉCHETTE](#) [lui freŝet] (1839–1908), unu el la gravaj franckanadaj verkistoj de la 19a jarcento. 130 paĝoj, kun nigraj-blankaj ilustraĵoj de la kanada pentristo [Frederick Simpson COBURN](#) (1871–1960). Publikigis tiun esperantlingvan eldonon Esperanto-Societo Kebekia en 2013.

« [...] *la beleco, la facileco de la lingvaĵo, la sincera homamo, kiu elradias el la noveloj, faras el la libro de Fréchetle idealan donacon – ne nur kristnaskan – al ĉiunivelaj esperantistoj.* » (Eugene de Zilah, La Gazeto, novembro 2014).

« *Aventuro, pioniroj, neĝoŝtormoj, glaĉeroj, riveroj, situacioj en kiuj la naturo estas malamika kaj malgastama : jen la ĉefaj ingrediencoj de la ses rakontoj, ĉiuj tre ĝuindaj kaj engaĝaj.* » (Sara Spanò, Literatura Foiro, aŭgusto 2015).

Kristnaskaj Rakontoj estas ideala kristnaska donaco por viaj amikoj-esperantistoj, aŭ vi mem ! Aĉetu paperan aŭ elektronikan eldonon per la retejo de Esperanto-Societo Kebekia : [www.esperanto.qc.ca/](http://www.esperanto.qc.ca/eo/eldonajhoj/)
[eo/eldonajhoj/](http://www.esperanto.qc.ca/eo/eldonajhoj/)

Papera eldono 23 CAD (kanadaj dolaroj) plus sendokostoj, elektronika eldono 14 CAD.

Esperanto-renkontiĝoj

14 — 17-a de junio : Komuna Landa Kongreso	Bostono, Usono
20 — 27-a de julio 2019 : UK	Lahtio, Finnlando
28-a de julio — 4-a de aŭgusto : IJK	Liptovský Hrádok, Slovakio
12 — 14-a de oktobro 2019 : ARE	Novjorkio, Usono
17-a de aŭgusto 2019	Paralela Universo
1 — 8-a de aŭgusto 2020: UK	Montrealo, Kanado

Montrealaj Esperanto-Kunvenoj

Ni renkontiĝas la duan kaj la lastan* vendredon de la monato, vespere, krom dum la somero. La renkontiĝoj okazas en la restoracio Resto Végo (suba saloneto) : [1720 rue Saint-Denis](#), metroo « Berri-UQAM ». Manĝo je la 18 h, babilado ekde 19:30 h. Speciale por lernantoj, Suzanne Roy foje okazigas ludecajn paroligajn kursojn, inter la 18:00 kaj la 19:00 en la sama tago, en la kafejo La Récréation, 404 rue Ontario Est. Post la paroliga kurso la grupo pluiras al Resto Végo. Bonvolu kontroli nian horaron ĉe la retejo de ESK : esperanto.qc.ca/eo/kalendaro/ aŭ vizitu nian FB-paĝon : facebook.com/EsperantoQuebec. Kontrolu ilin ankaŭ por vidi la datojn de renkontiĝoj en Kebeko !

* kutime la lasta vendredo estas la kvara vendredo de la monato, sed, se estas kvin vendredoj en la monato, ni renkontiĝas la kvinan vendredon.

Rencontres d'espéranto à Montréal

Les rencontres ont lieu les deuxième et dernier* vendredis de chaque mois, sauf pendant la période estivale. Le lieu des rencontres est le Resto Végo (petit salon en bas) : [1720 rue Saint-Denis](#), métro Berri-UQAM. Souper à 18 h, discussions à partir de 19 h 30. Spécialement pour les débutants, Suzanne Roy parfois anime des cours de conversation ludiques, de 18 h à 19 h, le même jour, au café La Récréation, au [404 rue Ontario Est](#). Après le cours de conversation, le groupe rejoint celui du Resto Végo. Veuillez vérifier le calendrier sur le site de la SQE: <http://www.esperanto.qc.ca/fr/calendrier/> ou notre page FB: facebook.com/EsperantoQuebec (pour Montréal ou Québec).

* Le plus souvent, le dernier vendredi du mois est le quatrième, mais, s'il y a cinq vendredis dans le mois, la rencontre a bien lieu le cinquième.

Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la autoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado kaj grafiko : Yevgeniya (Ĵenja) Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain. **Estraranoj de ESK** : Nicolas Viau (prezidanto), Suzanne Roy (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Joel Amis (konsilanto), Normand Fleury (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction et graphisme : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de la SQE** : Nicolas Viau (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Joel Amis (conseiller), Normand Fleury (conseiller).

Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2019.09.20

6595, rue Briand, Montréal H4E 3L4 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

Vizitu nian retejon !

Visitez notre site web !

www.esperanto.qc.ca



Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :

www.pasportaservo.org

Vi povas ankaŭ kontakti Jed-on Meltzer <jedmeltzer@gmail.com>, kiu estas la peranto por Kanado.